



# Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO  
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

**J A R A B O N O**

Jarabono : 65 fkoj

**P. BABIN**  
13, boulevard de la Chauvinière  
44300 Nantes  
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

**1987 - 4**

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

# EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La Indianoj de la Vivanta Fajro.



... La lando de Rabelais.

# KULTURAJ KAJEROJ

## Trimonata informada kaj kultura revuo

### REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

### ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
La jubilea semajno (F. Boyet)	3-4
La rolo de Esperanto (P. Métivier)	5-6
Rabelais en Anĵuo (B. Cheverry)	7-8
Paĝo de la geknaboj (A. Childs-Mee)	9
Pri la Indianoj	10-11
Por via Distro (C. Cavalié)	12
La vie de Gresillon	13-14

## El Gresillon

La venontjara programo anonciĝas riĉa denove. Dum la Printempa ferio-periodo okazos ne nur la kutima Renkonto de Infanoj sed ankaŭ Seminario pri la lingvo-instrumentoj. Nia celo estas helpi la amikojn, kiuj intencas instrui esperanton, aŭ jam instruas ĝin, sed bezonas respondojn al la demandoj, kiujn ili faras al si mem. El la aliaj staĝoj ni aparte mencias la ĉe-seminarion "A", dum du semajnoj, komence de julio. Fine de julio kaj en aŭgusto okazos specialaj kursoj por la preparado al la skriba parto de la Atesto pri Kapableco de la Franca Esperanto-Instituto. Fine ni deziras atentigi la legantojn de la romanoj de Valano, ke la aŭtoro gvidos mem staĝon "Ĉu verki Valane?".

Sukceso de kultura aranĝo postulas ankaŭ materiajn aranĝojn. Finfine la refaro de la verando, de la barilo ĉirkaŭ la banejo, la instalado de duŝejoj apud la tendumejo estas finitaj! La promeso de la entreprenistoj plenumiĝis kun "nur" 5-monata prokrasto! Espereble la antaŭviditaj laboroj por 1988 estas konstatablaj jam en junio.

\*\*\*\*\*



ĜOJAN  
KRISTNASKON!  
FELIĈAN  
NOVJARON!

## ĈU vi pagis vian abonon?

SENDU BANKĈEKON al Babin 13 bd Chauvinière 44300 Nantes  
POŝTĈEKKONTO: Nantes 2 813 61 L

# Esperanto tra la Mondo



## LA JUBILEO EN ZAGREB

Post la kongreso en Varsovio, centkvindeko da spektantoj el 38 landoj vojaĝis al Zagreb por la festivalo "100 jaroj de esperanto-kulturo" kaj la 20-a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF)

La ĉeestantoj povis aplaŭdi multajn trupojn kaj artistojn; Joëlle Rabu, Leningradan Esperanto-Teatron, Bulgaran Esperanto-Teatron, André Morel (franco), kiu prezentis "Candide" (Kandid), pupteatrajn trupojn el Tomsk (Sovetunio), Beograd, Budapeŝto, kaj filmojn. Paralele okazis simpozio pritraktanta la temon "Lingvaj problemoj en internacia komunikado".

## LA JUBILEAJ FILATELAĴOJ...

Okaze de la centjara datreveno de esperanto multaj landoj emisiis filatelaĵojn. Ni citu: poŝtmarkoj en Bulgario, Surinam, Pollando, Ĉinio, Kubo, Malto; poŝtmarka bloko en Germana Demokrata Respubliko, koverto en Sovet-Unio, poŝtaj tutaĵoj en aliaj landoj kaj multaj stampoj.

## ...KAJ MONUMENTOJ

Oni inaŭguris esperanto-monumenton "La espero" en la aŭstria urbo Graz, monumenton en Barreiro (Portugallio), buston de Zamenhof en Choisy-le-Roi kaj monumenton en Pau (Francio), buston de Zamenhof en Bulonjo okaze de la kongreso de SAT.

## EN SOVET-UNIO

-La unuan fojon eksterlandanoj (hungaraj kaj bulgaraj) partoprenis dum aprilo la Sovetian Esperantistan Junularan Tendaron en Rostov Velikij, apud Moskvo. La tendaro estis vizitata de Volodja Soroka, fama populara kantisto. Oni antaŭvidas aperon de granda disko de li kun esperantlingvaj kantoj.

Estono radio komencis elsendi el Tallinn en kaj pri Esperanto, ĵaŭde kaj dimanĉe de la unua kaj tria semajnoj.

## VINTRA FERIADO

De la 27-a de februaro ĝis la 5-a de marto 1988 okazos la 29-a Internacia Fervojista Esperantista Skisemajno en Spitzingsee (sude de Munkeno). Informas: S-ino K. Lencki, Niedersashsenweg 9, D-2110 Bucholz 5, FR Germanio.

## INTERESA POPULARSCIENCA REVUO

La kvaronjara revuo "Fokuso" publikigas tre interesajn artikolojn pri diversaj popularsciencaj temoj kaj informadiko. Ĝi meritas multajn legantojn. Petu senpagan provekzemplon al HEA-Fokuso, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

## FONDIGO DE KOOPERATIVA FAKO

Okaze de la UK de Varsovio estis fondita Internacia Kooperativa Esperanto-Organizo, kiu grupigas la diversajn branĉojn de la kooperativa aktivado.

ICEM-Esperanto (Instituto Kooperativa pri Edukado Moderna per Esperanto), movado Frenet, kies adreso estas 1, rue Galissonnière, Le Pallet, F-44330 Vallet, cetere aliĝis al tiu nova fako. I.K.E.O. eldonas revuon "Kooperativa Stelo". Adreso: Bekescsaba, Pf. 191, H-5601 Hungario.

## FLORAJ LUDOJ

Kataluna Esperanto-Asocio kaj la Konservantaro de la Internaciaj Floraj Ludoj invitas la ĉiulingvajn esperantistajn geverkistojn konkursi per siaj plej valoraj verkoj en la tradicia Festo de la 28-aj Internaciaj Floraj Ludoj, kiu okazos en la kadro de la 24-a Kataluna Kongreso de Esperanto en la jaro 1988-a.

# Jubilea Semajno

Okaze de la centjariĝo de Esperanto, oni organizis en la Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj, tio estas en Greziljono, iun specialan staĝon, dum unu semajno, kaj tiu staĝo ricevis la nomon: jubilea semajno.

Por tiu programo oni alvokis al prestiĝaj prelegantoj kun la intenco prezenti al la publiko la kulturan valoron de la lingvo. Pro diversaj malfacilaĵoj, la kunlaborado kun la usonano Dennis Keefe estis limigita al nur kelkaj prezentoj sed la aliaj invititoj havis la okazon prezenti la antaŭviditajn programerojn.

S-ro Georgo Lagrange prezentis la hungaran verkiston Istvan Nemere, S-ro Roberto Lloancy prezentis diversajn historiajn studojn pri la movado, S-ro Janton prezentis la temon "Zamenhof kaj la hebrea demando" kaj S-ro Michel Duc-Goninaz prezentis plurajn prelegojn pri Esperantologio.

Tiu jubilea semajno fakte okazis inter la vendredo 17-a de julio kaj la merkredo 22-a de julio inkluzive, tiel ke kelkafoje okazis tri kulturaj aranĝoj en la sama tago. Tiu intensa karaktero de la kultura vivo en la kulturdomo tre plaĉis al mi, kiu speciale venis por tio sed surprizis la homojn, kiuj kutimas veni al Greziljono por ripozi. Cetere la ĉeesto al la prelegoj ne estis deviga kaj laŭ mia opinio preferindas proponi fakultative kulturan nutrandon al tiuj, kiuj malsatas pri tia aktivado.

Mi povus raporti kalendare pri tiu semajno, sed mi preferas raporti laŭteme pri la diversaj prezentaĵoj.

Dennis Keefe precipe prezentis informojn kaj klarigojn pri la pedagogio en la instruado de lingvoj, tial li prezentis al ni la 17-an de julio la "Berlitz-metodon", la 20-an la metodo de Curran. Mi

notis, ke la Berlitz-metodo estas rekta metodo, kiu najbaras al la Ĉe-metodo, sed eble pli rigora pri la devigaj detaloj truditaj al la instruisto. Pri la metodo Curran, kiu baziĝas sur la ĝenerala psiko-pedagogio de Rogers, estas kvazaŭ kontraŭa poluso. Tiam la lernantoj estas tute liberaj, sed mi iom dubas pri la efikeco de tia metodo, kiun ni nur tre iomete spertis, lernante la hispanan lingvon.

Georgo Lagrange prezentis al ni la verkojn de Istvan Nemere. Li montris la karakterizon de tiu literaturo, kiu estas abunda, eble ne tre profunda, sed kies karakteroj koincidas kun la eldonaj postuloj, kiuj kvazaŭ trudas la eldonon de ne tro dikaj volumoj. Per preciza arigo de la diversaj verkoj de tiu aŭtoro, la preleganto montris la diversajn ĉefajn interesocelojn, kiuj aperis en la verkaro de tiu hungaro, en rilato kun liaj vivkondiĉoj.

P-ro Janton prezentis sian temon la 21-an. La prelego daŭris du horojn kaj duono. Iuj opinias, ke tio superas la kapablojn de la aŭskultantoj; kompreneble tio dependas de la aŭskultantaro. Persone mi tute ne sentis lacecon pro la intereso de la temo. Mi antaŭe legis la verkon "La kaŝita vivo de D-ro Zamenhof", kaj eble pro tio jam kutimiĝis pri tiu temo. Speciale, la nepublikado de la unua broŝuro pri Hilelismo estas simptomo de la evoluo de la Zamenhofa opinio en tiu komeno de la 20-a jc.

Roberto Lloancy prezentis tri prelegojn: "Esperanto dum la unua mondmilito", "La proverbaro", "la mistera U.K. en Barcelono". Pri la proverbaro li, kiu instruas la lingvon, konsilis al la aliaj instruantoj uzi la Proverbaron por pli bone enkonduki la lernantojn en profundan komprenon de la lingvo.

Pri la stato de Esperanto dum la unua mondmilito, la intereso kuŝis en la fakto, ke S-ro Lloancy havis la okazon ricevi malnovajn dokumentojn, ekzemple la bultenon redaktitan en Esperanto de la francaj militkaptitoj en Munster. Kompreneble la preleganto lokis tiujn informojn en ĝenerala rigardo pri la sinteno

de multaj uzantoj de Esperanto, kaj la nacieca propagando kaj aliflanke la rolo de UEA favore al ĉiuj viktimoj de la milito. Tiu elvoko montras, ke en tiu epoko Esperanto estis jam alte taksata lingvo, eĉ fare de ĝiaj malamikoj.

Sed, almenaŭ por mi, la plej surpriza rakonto estis la tre detala studo pri la kongreso en Barcelono. R. Lloancy, kiu estas kataluno, arigis multajn dokumentojn - li eĉ aludis pri kataluna filmo - kiu montras la gravecon de Esperanto en la revoluciaj medioj de Katalunio. Per tute scienca studo de la Zamenhofaj paroladoj en la Universalaj Kongresoj, la oratoro montris, ke tiu Barcelona parolado estas escepto, kiu verŝajne kaŝas ion. Laŭ mia persona opinio, tia studo meritis aperi, kiel presita eseo, kiu certe interesege multe pli larĝan publikon.

Mi konservis por la fino la prelegaron de P-ro Duc-Goninaz pri Esperantologio. En kvin prelegoj la lingvisto sukcesis, per zorga elekto en la sinsekvo de la temoj, konduki la aŭskultantaron al memkritiko de kelkaj dogmoj, kiuj opoziciis la esperantistojn. Unue la preleganto montris, ke la tiel fama 16-regula gramatiko ne povas esti la nura bazo de la lingvo, unuflanke, ĉar ĝi tute ne estas kompleta, aliflanke, ĉar la lingvo evoluis kaj oni ne povas samtempe postuli rigidan leĝon kaj deziri la evoluon de la lingvo.

En la dua prelego la oratoro montris, ke la tradicia priskribo de esperanto, kiu estas ofte uzata kaj en propagando kaj en instruado, tute ne taŭgas laŭ lingvistika vidpunkto. La plej rimarkinda afero en tio estas, ke Zamenhof mem tre lingvistike priskribis sian lingvon en artikolo de la Fundamenta Krestomatio, sed oni tiam ne sufiĉe atentis pri la kontraŭdiroj inter tiu klarigo, kaj la tradicia uzado de la gramatikaj terminoj tiritaj el la klasikaj aŭ Eŭropaj lingvoj. Kompreneble ne sufiĉas detruiri, kaj S-ro Duc-Goninaz, antaŭ la batalo inter "monemoj" kaj "morfemoj" proponas pure esperantan esprimon: "lingveroj". Kompreneble, se oni rifuzas la terminojn "prefiksoj", "sufiksoj",

"radikoj", oni devas trovi regulojn por la kunligo de la lingveroj.

La tria prelego denove eksplodigis tradician terminon: kio estas vorto? La parolanto montris, ke nek la difino per la uzo en frazo (kiel parto de mesaĝo) nek la difino per la markoj (la tradiciaj finaĵoj montras, ke io finiĝas) estas plene kontentigaj.

La kvara temo verŝajne bremsos la argumentojn de la propagandistoj, kiuj emfazas pri la "reguleco" de Esperanto. La preleganto montris la relativecon de tiu koncepto. Neniu lingvo estas regula; oni nur povas diri, ke de iu lingvo al la alia la "esceptoj" al la reguloj estas pli aŭ malpli multaj. Cetere la koncepto pri reguleco ne estas la sama por la lingvistoj, kiuj analizas la lingvon kaj por la parolantoj, kiuj uzas la lingvon. Restas multaj malregulaĵoj en Esperanto.

La lasta prelego proponis cerbumadon pri la koncepto de "normo". Kiam eraro fariĝas regulo, kaj kiam eraro fariĝas peko? Estas granda diferenco inter la lingvisto, kiu priskribas la lingvon kaj la instruanto, kiu preskribas ĝiajn regulojn. Cetere la normoj estas ĉiam eksterlingvaj; la problemo estas elekti inter la 16-regula gramatiko, la tuta Fundamento, la uzo de Zamenhof, la konsiloj de la Akademio...kaj la efika interkompreniĝo.

Kion konkludi post tiu rapida elvoko de tiu jubilea semajno? Unue okaze de tiu jubilea jaro Greziljono montris, ke ĝi estas loko, kie oni povas serioze plilarĝigi sian kulturon. Due la prelegantoj montris la kulturan valoron de la parolata internacia lingvo, kaj tio okazas tro ofte nur en Universalaj Kongresoj. Trie la prelegoj montris, ke pri seriozaj temoj oni povas interesi publikon de nefakuloj. Pri tiu lasta punkto, oni nur povas bedaŭri, ke ĝuste pro la fakto, ke tiu semajno okazis en la sama jaro, kiel la fama kongreso en Varsovio, la publiko en la kastelo ne estis tiel abunda, kiel ĝi estas en aliaj cirkonstancoj.

Fernand Boyet

# La rolo de Esperanto

Tute ne estas mia intenco paroli pri la lingva valoro de Esperanto. Jam de longe ni ĉiuj estas konviktaj laŭsperte, ke ĝia mirinda strukturo ebligas senliman evoluon. En ĉiuj fakoj, kompetentaj aŭtoroj jam ofte kontentige sukcesis prezenti klare sian tezon. En la ĉiutaga vivo ni povas esprimi plej fidele niajn pensojn kaj emociojn. Esperanto estas vera moderna lingvo.

De post la plej antikvaj tempoj la homo cerbumis por plibonigi siajn vivkondiĉojn. Vere geniaj teknikaj inventaĵoj finfine profunde modifis la ĉiutagan materialan vivon. Sed pli ol la plej katastrofaj efikoj de la foje malamika naturo, pli ol la konstanta klopodo realigi novajn ilojn, kiuj devas alporti tre relativan pliboniĝon, plej grava estas la stato de la rilatoj inter la homoj mem sur la kampoj intersoci-grupa kaj sekve interindividua. Kaj, bedaŭrinde, ni devas konstati, ke sur tiu grava flanko, survoje al civilizacio, ni staras ankoraŭ ĉe la nula punkto. La historio de ĉiuj popoloj listigas daŭre kverelojn, militojn, konkerojn. Ambiciaj princoj kuntrenis kun si tutajn popolojn por semi morton kaj suferojn ĉe aliaj nacioj. Antaŭ 100 jaroj Zamenhof proponis Esperanton al la homaro, kun la arda deziro, ke establiĝu amikiga interkompreniĝo. Laŭ nia movada historio inspiris lin aparta akra situacio plurgenta en Bjalistok, sed, tute certe liaj pensoj ampleksis la tutmondan situacion. Al la genia lingva kreaĵo li aldonis la grandegan forton de sia koranimo. Ni povas diri, ke en 1887 aperis la unua kaj plej efika rimedo konduki la homaron al vere inda homa konduto. Tamen dum tiu lasta jarcento nenio vere ŝanĝiĝis. Du tutmondaj militoj plej kruele detruis homojn kaj landojn. Miliono da homoj devis forlasi sian hejmon, sian laboron, sian normalan kvietan vivon por porti morton ĉe aliaj popoloj. Ili certe ne deziris tion fari: la malamiko ne troviĝas nur ĉe la alia flanko

de la landlimo, sed egale en ĉiuj landoj, kie regantoj devigas homojn fariĝi anonimaj murdistoj.

Do, tie klare aperas la granda forto de Esperanto, la ĉefa rolo de la internacia lingvo: tio estas laŭte krii: "homoj, fratoj de ĉiuj regionoj de la terglobo, de nun ni ĵuras konduti homece, ne plu kiel kruda besto. Ni rifuzas la mensogon. Ni forpuŝas la eterne trompajn vortojn pri patrujo."

Ni, esperantistoj, en nia sincera deziro akceli la rekonon de la lingvo, ni klopodas nun ĉefe ĉe la politikaj aŭtoritatuloj sed mi opinias, ke, tiudirekte, oni plej ofte perdas energion. La rolo de la politikistoj, ie ajn, estas agi laŭ naciemaj kriterioj. Ili ne estas emaj pensi kaj agi por monduiĝo. Kiam ili argumentas, ke la lingvo ne taŭgas, tio estas nur preteksto por ne konfesi sian opozicion al la principo de internacieco. Ni volas demonstri, ke esperanto povas helpi kaj taŭgas por pritrakti sciencajn aferojn. Jes, sed la sciencoj tute ne bezonis esperanton por progresi kaj atingi la altan nivelon, kiun oni povas foje bedaŭri.

Vojaĝi al ĉiuj anguloj de la planedo? Ankaŭ sen esperanto oni bone povas: sufiĉas havi monon kaj tempon. Ankaŭ pro simplaj bagatelaj interŝanĝoj oni povas argumenti favore al esperanto. Sed la vera celo de nia lingvo estas io alia: antaŭ ĉio doni la eblecon al la milionamasaj popoloj ne plu esti nuraj nulaj kolektivoj; doni al la simplaj homoj, kiuj ne povas lerni kelkajn fremdajn lingvojn en superaj lernejoj, la eblecon esprimi sian naturan deziron vivi indan homan vivon. Mi estas ankaŭ preta aprezi tiujn kulturajn valorojn, kiuj povas pli alten levi la homan animon sed mi dubas pri la signifo de la vortoj, kiam mi konstatas, ke la decidantoj en la mondo, ĝis nun, ne sukcesis establi socion, kie ne regus konstanta minaco. Meze de nia jarcento, en pluraj landoj de Eŭropo, regis diktaturoj, kiuj disvastigis sian venenigan agadon al la tuta kontinento. Dum tiu malluma periodo esperantistaj asocioj submetiĝis por ne malplaĉi

al la nova reĝimo. Sed la rezulto estis: Esperanto estis malgraŭ tio silentigata, la kunlaborantaj aktoroj perdis sian honoron kaj finfine perdis eĉ la vivon.

Nun la situacio estas jena: reprezentantoj diversnivelaj de la registaroj venas eĉ al niaj kongresoj por laŭdian porpacan laboron kaj samtempe oni fabrikas kaj komercas la plej terurajn armilojn por estonta milito. Estas klare pli ol naive sonorigi ĉe tiuj oficialaj pordoj por almozpeti la rajton ekzisti.

Nun kiamaniere esperanto povas plenumi sian rolon? Mi opinias, ke estus dezirinde, ke la instruistaro en ĉiuj landoj, sen atendi instrukciojn de sia ministerio, preparu la infanojn de la novaj generacioj al nova pensmaniero tutmondaneca. Nur la junuloj estas modleblaj, edukeblaj; ĉe la

plenaĝuloj, ĝenerale, estas tro malfrue por korekti la tradician misformadon. Oni devus komprenigi al la nova generacio, ke la vera patrujo estas la tuta terglobo, ke la homa raso estas unu nura frata kolektivo kaj ke nepre devas esti malpermesata la uzo de ia ajn armilo por solvi kverelojn. Jam la civila juro de ĉiuj landoj instruas tion. Kial la aŭtoritato agas kontraŭdire, kiam temas pri milito? Jen plia krima sinteno, kiun ni plej energie devas denunci.

Al la bonintencaj homoj esperanto povas servi por realigi tiujn bonajn principojn kondiĉe ke ni estu ne nur uzantoj sed ankaŭ adeptoj de la ideo de Zamenhof.

Pierre Métivier

(El prelego farita en Gresillon)

\*\*\*\*\*

## Lastatempe aperis

- Granda disko de la kanadana kantistino Joëlle Rabu: "Passport", kun kantoj en esperanto, kaj en franca kaj angla lingvoj (kun tradukoj de ĉiuj kantoj en la tri lingvojn sur aparta folio). Vere tre agrabla voĉo.

- "Antologio de fantastaj rakontoj de sovetaj verkistoj", vol. 1 kaj vol. 2.

- "Sferoj" 5. Scienca fikcio kaj fantasto. Diversaj tradukaĵoj nur el tekstoj de diverslandaj virinaj verkistoj.

- "Studoj pri la internacia lingvo". Redaktis Michel Duc-Goninaz, kun artikoloj de pluraj lingvistoj.

- "Sur la bordo" de Nevil Shute, tradukita de K.G. Linton; pri la rezulto de nuklea milito (romano).

- Okaze de la jubileo de esperanto serio de notindaj libroj aperis de du jaroj en Bulgario. Ni citu kelkajn titolojn: "Bulgara nuntempa poezio kaj prozo - Antologio", "Antologio Rozo kaj Glavo: originalaj

poemoj de bulgaraj esperantistoj (1906-1986)", "Tra la Ventego (elektita verkaro de Smirnenski)", "Hristo Botev, elektita verkaro", "Esperanto-poetoj de Bulgario (studoj pri la plej gravaj)" de Canko Murgin, "Mia verda pado (eseoj kaj rakontoj) de Hristo Gorov.

\*\*\*\*\*

### NE PLU ATENDU !

TUJ PETU NIAN PROGRAMON

ESPERANTO \_ DOMO

Grésillon F\_49150 Baugé



# RABELAIS

## en sia lando

Rabelais famkonata franca verkisto de la komenco de la 16-a jarcento montris talenton multifacetan en epoko avida je sciencoj kaj pripensado. Samtempe humanisto kaj medicisto li ne povis malestimi la plej vulgarajn, naturajn homajn elmontraĵojn, intelektajn aŭ fizikajn. Tiujn li redonis al ni sub formo de epopeaj parodioj, satiroj, komedioj, argumentadoj plej realismaj. Tamen mi volas nur elvoki la influon de la regiono (nia regiono ĉar en ĝi situas Gresillon), tute ne pristudi la verkaron de la aŭtoro.

Kiel vi scias Rabelais naskiĝis, je la fino de la 15-a jarcento, en la regiono de Chinon (Sinon). Li asertis, ke Chinon devenas de la nomo Kaino, filo de Adamo kaj Eva. Ĉu? Ne gravas ĉu li pravas aŭ ne. Ni rajtas diri, ke la regiono, kie li naskiĝis havis tre grandan influon en liaj priskriboj de estuloj, lokoj, okazaĵoj. Li travivis la unuajn jarojn en La Devinière, malgranda bieno de lia prapatro. La loĝejo, meze de vitejoj, estis konstruita sur grandegaj enrokaj keloj, meze de regiono riĉa je legendoj kaj bona vino. Tie Rabelais lokis famajn epizodojn de la "Pikrokolina Milito" (La Guerre Picrocholine). La apuda abatejo, kiu estis arde defendata de Frato Johano de Entommeurs iĝis la bieno de "Grangousier". Tiu naskiĝloko de Rabelais troviĝas en Turanĝio, sed proksime de Anĵu, en tempoj, kiam la feŭdaj landlimoj estis ege ŝanĝemaj. Plie, li vivis dum pluraj jaroj en Anĵu, kie li havis parencojn kaj amikojn. Oni do povas aserti, ke ambaŭ regionoj ludis gravan rolon en la vivo kaj verkaro de la patro de "Gargantua". La loĝantaro de lia naskiĝloko estis sub dependeco de la impona, religia stablo abatejo "Fontevraud". La influo de tiu abatejo iris eĉ ĝis Saumur, dekkvin kilometrojn

okcidenten, kie ĝi posedis tutan kvartalon kaj multajn privilegiojn. Oni povas facile imagi, ke la enspezo de tiom da mono el diversaj fontoj, en rivaleco kun aliaj religiaj aŭ nobelaj potenculoj, estigis procezojn kaj interbatalojn antaŭ la tribunaloj. Tiuj epizodoj donis al la submetita popolo bonajn okazojn primoki la superulojn kaj nutri konversaciojn en la trinkejoj, kiel "La Lamproie" (petromizo) citita de Rabelais. En tiaj okazaĵoj la juna, vigla, Francisko larĝe malfermis siajn okulojn kaj orelojn, amuziĝis, observadis, enkapigis kaj, dank'al akra memor-kapablo, redonis, laŭ persona stilo, la gajajn rakontojn: "La batalo de la platkukisto", la "Pikrokolina Milito". Bona observanto, la junulo, ofte promenrajdanta kun sia patro advokato kaj intendanto-konsilanto de la tiama abatestrino de Fontevraud, el reĝa familio devenanta, iris tra la kamparoj kaj urboj. Francisko Rabelais havis la okazon aŭdi plendojn de iuj, mok-rakontojn de aliaj kaj li neniam forgesis la ĉirkaŭantan, la familian kadrojn kaj la bildojn de la junaĝo. Tre certe, en la 3-a libro de "Pantagruel" en ĉapitro pri la "Konfeso de virinoj" la loĝantaro de Fontevraud rolis, kiel modelo

Tutcerte Rabelais vivis dum pluraj jaroj en la ĉefurbo de Anĵu. Ĉu li estis novice en monaĥejo "Baumette" apud Angers? Oni ja scias, ke poste li pastrigis. Tamen, novice aŭ ne, li vivis tie. En la 12-a ĉapitro de "Gargantua" oni legas pri tri altranguloj, kiuj vizitas Grangousier, la patro de Gargantua. Ili demandas pri la ĉevaloj kaj Gargantua kondukas ilin supren per du diversaj ŝtuparoj. Dum la suprenirado servistoj miras: "Neniam staloj troviĝas ĉe la supro de la domoj!". "Vi malpravas", respondas la gvidanto, "ĉar estas lokoj tiaj en Liono, en Chinon kaj en "la Baumette". Fakte en la monaĥejo "La Baumette", nun privata domego, apogita al firma roko, kiu superstaras la rivero "Maine", la antikvaj staloj okupis la supran parton de la loĝejo.

Tiamaniere la bestoj ne suferis pro la sezonaj inundoj kaj, la tutan jaron, ili povis iri, samnivele, de la subĉielaj al la internaj manĝejoj. Kompreneble ekzistis ankaŭ natura deklivo, sed Rabelais estis impresita de la nekutima situo de la staloj. Aliflanke, en Angers, Rabelais ŝatis renkonti amikajn studentojn en la taverno de sia onklo "Frappin". Tie li aŭdis pri la bataloj de la pigoj (milittrupoj de la duko de Bretonio, kun nigra-blanka blazono), kaj la garoloj (milittrupoj de la franca reĝo). Pro tiuj rakontoj kaj la komikaj desegnaĵoj kovrantaj la murojn de la trinkejo, Rabelais plurfoje en "Gargantua" kaj "Pantagruel" aludis al la fama batalo de Saint Aubin du Cormier.

Sed verŝajne ne nur por trinki kaj amuziĝi Rabelais kaj liaj kolegoj venis al la taverno. Tiu loko, proksima al la hospitalo "Sankta Johano" (nun muzeo), akceptis la medicinajn studentojn post tre danĝera laboro: la dissektado de mortintoj. Tion ili praktikis en la keloj, kvankam la tutpotenca eklezio tiam malpermesis tiun formon de studado. Oni pli bone komprenas la trinkadojn kaj amuziĝojn en la taverno de la onklo. Kelkaj opinias, ke Rabelais studis medicinon en Montpellier. Tie li diplomiĝis sed en la 16-a jarcento ĉiu provinca fakultato havis siajn proprajn diplomojn. Tiamaj medicistoj deziris sin defendi kontraŭ eventuala konkurenco de fremduloj kaj ofte ne alte taksis la pergamenojn disdonitajn de la aliaj fakultatoj. Sed ĉiu diplomito de iu fakultato rajtis trapasi la ekzamenojn de alia. Longe antaŭ 1530, jaro de la registrado en Montpellier, Francisko pruvis medicinajn konojn. Eĉ dum la studjaroj en Montpellier li kuracis en Liono. Cetere, kiam Rabelais vortpentras la diversajn urbojn en kiuj lia heroo "Pantagruel" studis, li citas Angers. En 1518 estis terura pest-epidemia en Angers kaj Rabelais iris suden al Fontenay-le-Comte, kie, kun sia amiko, la humanisto Tiraqueau (Tirako), li studis la grekan lingvon, tiun de Hipokrato.

El la verkaro de Rabelais oni povas ĉerpi aliajn aludojn pri Angers. Kiel oni scias; Pantagruel ĝuis eksterordinaran apetiton kaj forglutis ĉion, kion li povis havi enmane. "Iun tagon, trinkante lakton ĉe bovin-mamo mem, li englutis la tutan bovinon, kiel li englutus kolbason. Sekve de tio oni ligis lin al la lulilo sed li rompis ĉiujn ŝnurojn. Oni fine elektis ferajn ĉenojn". Poste Rabelais skribas: "Unu el ili (el la ĉenoj) iris al la Rochelle por protekti la tiean haven-enirejon, alia al Liono, alia al Angers. La kvara estis forportita de la diabloj por firme ligi Luciferon, tiam iom tro tumultema!". La Angers-anoj povas rekoni la iamajn fer-ŝnuregojn ĉiunokte streĉitajn trans la rivero Maine, norde kaj sude de la urbo, por protekti ĝin kontraŭ la kontrabandistoj kaj pagigi impostojn al la var-ŝipoj. Tiuj ŝnuregoj lasis sian nomon al la pontoj "Haute Chaine", (almona ĉeno), kaj "Basse Chaine" (almara ĉeno). En alia paĝo li komparas la sveltajn kolonetojn, el pura "Plantagenet-stilo", de la preĝejo Sankta Serĝio al rosto-stangoj.

En libro 5-a de "Pantagruel", la priskribo de la insulo de la "Dik-peltaj Katoj" (verŝajne la juĝistoj) estis inspirita de la famaj "Misteroj", subĉielaj teatro-prezentadoj kun imponaj scenoj, multnombraj aktoroj kaj densa spektantaro, ofte prezentitaj tiam en Angers, Saumur kaj Doué.

Ni ne forgesu, ke Rabelais ŝategis la regionajn vinojn kaj ofte aludas al la turanĝiaj kaj anĵuaj vinoj. Kreiĝis fratara "les Sacavins" ("la vin-sakoj") sub patroneco de Rabelais, kies figuro aperas sur la standardoj. Okaze de festoj la membroj surmetas vestojn kaj ĉapelojn, kiuj similas tiujn de la patrono kaj la akcepto de novaj membroj plej ofte okazas en la keloj de la iama hospitalo "Sankta Johano".

B. Cheverry

# PAĜO DE LA GEKNABOJ

Se en via loĝloko troviĝas grupo de skoltoj aŭ skoltinoj, eble interesus ilin scii pri la Skolta Esperanto-Ligo, kiu estis fondita en 1918. La celoj de la Ligo ( SEL ), estas: " disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto, kaj Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj. Krei skoltan literaturon en Esperanto. Eldoni internacian skoltan revuon. Solidarigi la senton de frateco inter diversnaciaj junuloj. La Ligo daŭre aktivas por la oficialigo de Esperanto fare de la skolta movado." ( Jarlibro de UEA, 1987 ).

Kvankam oni skribas nur "skoltoj" kaj "junuloj", la Skolta Movado estas ankaŭ por "skoltinoj", "junulinoj" kaj la skoltaj idealoj por ĉiuj, kiuj deziras, ke amikeco ligu gejunulojn ĉie.


Jen teksto el la plej lasta numero de "La Skolta Mondo", la internacia skolta revuo. Vi konstatos, ke geskoltojn interesas plej diversaj temoj.

## La malrapida okulo


La okulo estas iom malrapida, kiam du bildoj venas unu post la alia. Tiam la okulo intermiksas ilin, ĉar ĝi bezonas iom da tempo antaŭ ol ĝi "fororgesas" la unuan bildon.

## Metu la birdon en la kaĝon

Prenu ŝildeton el kartono, kaj ligu ŝnuron je ambaŭ flankoj, kiel en la desegno:



Turnu la ŝildeton plurfoje, tiel ke la ŝnuroj vindiĝas:



Prenu ŝnuron en ĉiu mano kaj tiru. Tiel vi povas turni la ŝildeton kaj, kun iom da ekzerco, vi povas turni ĝin tiel longe, kiel vi volas. Kiam vi sukcesis en tio vi desegnu birdon sur la ŝildon kaj aliflanke kaĝon, sed kun la supro malsupre:



Kiam vi rigardas la ŝildeton dum ĝi turniĝas vi konstatos, ke vi vidas la birdon sidanta en la kaĝo.

Se plaĉus al vi scii pli pri ĉi tiu kaj aliaj temoj interesaj, skribu al la redaktoro, Hans A. Rosbach, Bambleveien 2, N-3700 Skien, Norvegio. Ne forgesu aldoni internacian respondkuponon por ricevi respondon.

# La Indianoj

Kiam maturiĝis la maizo, komenciĝis nova jaro. Ceremonioj okazis je la unua luno post la maiz-maturiĝo. En la mezo de la vilaĝo staris la templo de la Suno. Tie brulis la atente prizorgata fajro. Tiu fajro, kvazaŭ viva, estis misterplena kaj grandioza. Nur la tiucele elektita viro rajtis prizorgi ĝin. Netaŭga prizorgado rezultigis la morton de la fuŝulo.

Komence de la nova jaro oni estingis la fajrojn, purigis kaj riparigis la domojn, reordigis la vestaĵojn kaj surmetis novajn. Oni disrompis la terpotojn kaj la korbojn kaj fabrikis novajn. En tiu periodo de renaskiĝo nenio malnova aŭ eluzita rajtis pluekzisti. Eĉ la pasintaj malbonfaroj ricevis pardonon kaj forgeson dank'al tiu morala kaj fizika purigo-rito. Dum ok tagoj daŭris la ceremonioj. La unuan tagon la militistoj alportis kvar arbo-trunkojn sur la placon. Per ili, ili formis krucon, kies branĉoj aparte montris la kvar ĉefdirektojn. La viroj kantis kaj dancis laŭ religiaj reguloj. Eĉ la ludoj havis specialan signifon okaze de tiu ĉiujara celebrado. La kvara tago estis gravega. Oni forigis la cindron el ĉiu fajrejo kaj anstataŭigis ĝin per pura sablo. Ĉe la sunleviĝo estis ekbruligata nova fajro: la "ekbruligisto" rapide turnis stangeton inter siaj premitaj manoj, aŭ helpe de arko, kies ŝnureto estis volvita ĉirkaŭ la stangeto. La malsupra ekstremo de tiu stangeto lokiĝis en la tindro-plena foldo kavigita en ligno-peco. La varmo kaŭzita de la frot-movo elflamigis la tindro-pulvoron. Tiam la "ekbruligisto" metis pecetojn de sekaj fungoj sur tiu konsumiĝanta pulvoro kaj ruĝa brileto vidiĝis. La "ekbruligisto" metis la braĝon en bukedon de sekaj folioj kaj rigardis al la Oriento, kie vivas la Suno, mastro de la fajro. Li balancis la folio-bukedon de oriento okcidenten kaj kiam aperis flamo, li lokis ĝin en la centro de la kruco formita per la kvar

arbo-trunkoj: la Nova Fajro ekbrulis. Oni neniam blovis sur fajro aŭ fajreroj, ĉar la homa blovo entenas malpuraĵojn kaj la fajro estis protektenda kontraŭ ĉio profana. Tiam la ekbruligisto rondiris ĉirkaŭ la fajro, kantante, Neniu komprenis la parolojn de la kanto ĉar ili estis la paroloj de la Suno. Al tiu fajro estis oferitaj la unuaj maizo kaj la unuaj fruktoj. Poste, ĉiu virino ricevis iom da braĝo, kiun ŝi portis hejmen por ekbruligi la novan familian fajron.

La vilaĝoj de la Indianoj "Creeks" estis duŝpecaj, la ruĝaj kaj la blankaj. Ĉe la enirejo de ĉiu vilaĝo staris fosto farbita ruĝa aŭ blanka. La ruĝaj vilaĝoj estis la "militaj" vilaĝoj, kie la sango rajtis flui. La blankaj vilaĝoj estis la "pacaj" vilaĝoj, kie la loĝantoj estis protektataj. En ĉiuj cirkonstancoj ili devis esti paciniciatantoj. Kiam kunsidis milit-konsilio ili devis paroli favore al la paco kaj prezenti ĉiujn argumentojn por defendi ĝin. Blanko estis la pac-koloro. Kiam malamiko eniris la vilaĝon kun blankaj plumoj kaj blank-farbita buŝo, neniu rajtis ataki lin. Li povis daŭre vivi tie protektita de la Pac-vilaĝanoj.

Tiuj Indianoj multe ŝatis kunkurojn kaj pilko-ludojn. La atletoj regule trejniĝis ĉar la ludoj postulis grandajn fizikajn kvalitojn. En ĉiu vilaĝo ekzistis "ĉunke"-ludejon. Oni ludis per ŝton-disko, kiun oni puŝrulis helpe de stangeto. Unu el la ekstretoj de tiu stangeto estis hokforma. La celo estis ĵeti la stangeton sufiĉe lerte por ke la disko restu en la hoko, kiam ĝi falis.

Unu el la plej ŝatataj nutraĵoj estis la "coontie" (kunti). Ĝi konsistis el la muelitaj radikoj de tiea planto. El tiu faruno ili faris kukojn. Oni ankaŭ faris specon de pano, aldonante en la farunon sekajn fruktojn de persimonarbo. Kelkaj palmarboj provizis la homojn per legomo, kies gusto multe similis tiu de la brasiko.

En tiu lando fluis multaj riveroj. La urboj kaj la kampoj etendiĝis laŭlonge de tiuj riveroj. Pro tio oni nomis ilin la Popolo de la Riveroj (Creeks). Ilia vivo, iliaj kutimoj multe similis tiujn de la antikvaj civilizacioj de Malnova Meksikio. Laŭ la tradicio ili venis de malproksima okcidenta lando. La temploj, la domoj konstruitaj ĉirkaŭ meza placo, la eterna fajro iom similis la mirindajn kompleksajn civilizacioj de la meksikiaj Indianoj. Eble tio indikas rilatojn en malproksimaj tempoj.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

En tiu suda parto de la kontinento kreskis palm-arboj kaj bambuoj sur fertila grundo, sub mildaj pluvofaloj. Paradizo de la brilplumaraj birdoj, de la rozkoloraj fenikopteroj kaj de la blankaj ardeoj.

Dissemitaj sur la tuta surfaco de la teritorio staris la fortikigitaj urboj de la sud-orientaj Indianoj. La domoj, plej ofte duĉambraj, estis longaj konstruaĵoj. Sur ligna truso oni metis tegmenton el interplektitaj bambuoj kaj, interne kaj ekstere, oni pendigis matojn. Okazis, ke la muroj estis tegitaj per argilo. Sur la tegmentoj oni aldonis palmfoliojn. En la plej varma parto de la teritorio la domoj estis nur senmuraj ŝirmejoj. Ĉiuj domoj estis konstruitaj ĉirkaŭ kvadrata centra placo. Palisaro el altaj pintaj fostoj protekte ĉirkaŭis la vilaĝon. Dise staris teramasoj; ili estis por la mortintoj tomboj kaj memor-monumentoj dum la domoj estis por la vivantoj ŝirmejoj kaj protektejoj. La konstruo de la teramasoj estis okazo de komuna laboro, simbolo de la aspiroj de tuta popolo.

La sud-orientaj Indianoj uzis pli da bambuoj ol da ligno. Ili plektis ilin por fari korbojn, ŝildojn kaj eĉ kirasojn. Ankaŭ ilia plej utila armilo estis farita el bambuo: la cerbatano tra kiu ili blove ĵetis longajn maldikajn sagetojn al la bestoj.



Tiuj sagetoj, tre pintaj ĉe unu ekstremo estis ĉe la alia envolvitaj en iu lanuga aŭ kotona materio planto-devena. La pinto kelkfoje konsistis el konkopeco aŭ ergoto de Meleagro.

Ĉar ili vivis apud la granda golfo, nuna Meksikia Golfo, ili trovis sian nutraĵon el la maro. La konkoj ankaŭ utilis, kiel tranĉiloj eĉ kiel pladoj aŭ kultiviloj. La vestaĵoj ne multe utilis al ili, sed ĉar ili ŝatis la kolorojn ili faris al si mantelojn el multkoloraj birdo-plumoj. Ili surmetis tiujn mantelojn okaze de ceremonioj kune kun longaj brilaj plumoj sur la kapo. Kelkaj viroj estis kelkfoje kvazaŭaj ilustritaj libroj, ĉar iliaj kuraĝaj faroj estis rakontitaj sur ilia korpo per tatuadoj. La pirogoj estis faritaj el kavigitaj arbo-trunkoj. Betuloj ne kreskis tie kaj oni utiligis kotonarbojn aŭ cipresojn, kiujn oni unue bruligis ekstere kaj poste kavigis per ŝtonhakilo. La tiel konstruitaj pirogoj estis tute ekvilibrataj. La loĝantoj de tiu marbordo ofte trovis perlojn, kiujn ili uzis por fari kolringojn kaj braceletojn. Sed la Hispanoj forrabis ilin el la domoj, eĉ el la tomboj. Oni rakontas, ke de Soto forrabis ducent kilogramojn da perloj.

Kiel la Indianoj de la Arbaro la sud-orientaj Indianoj vivis en konstantaj vilaĝoj, ĉasis kaj kultivis. Sude de tiu teritorio, pro sabla malfekunda grundo, la vilaĝoj grupiĝis sur la bordo mem de la maro aŭ en la valoj de la riveroj.



# POR VIA DISTRO

La konstruotaj vortoj estis:  
 MAJO-STELO-PLACO-KANO-KATO-KROPO-  
 PERKO-PIGO-KRETO-MUSO-PRAMO-PILKO-  
 BOTO-TIEL-LAGO-TRONO-RATO-ŜARKO-  
 FLAVA-PINO-TASO-BOJO-KIAM-KORO-  
 CIMO-KRIMO-KALO-BROSO-FOJNO-MONO.

\*\*\*\*\*

## NOVA ENIGMO

buĝetistino	markitoj (radikalo)	per fer- mita mano	reparata penetrando	seksa dibotado	meblo
uzado de potrosuŝilo	skribil'	flor'	metalo		simbolo
blekego				eminent- ul'	
majur- unuan			gicinjga lojanga recipro- kado		
				kordini- trument'	
rojplano				vansemaj	
prepozicio	pronomo		atmosfere		mal- tristaj
	post opo- racio ĉu akcidento		longmem- bra simio		
karega		alpren'			membro de U.E.A. (siglo)
floro		subtenil'		eksa	
				rilata al dometo	
siglo pri Argentino		pendolo- raj			
scienco		hormon'			
					okaza- so
ŝlimo				noto	interjek- cio
legi post frakturo				ĵabos la ensema- raĵon	trinkaĵ'
			zina tambur'		
			simo'		
sen- spruca				gaso	
metall'				verba supluso	
		moviĝon ia direkto			malmola metalo
		malofa metalo			prepozicio
skismulon					
ili parata- das de la radio				rilata al akra rando de objekto	

# LA VIE DE GRÉSILLON

## Kunveno de la komitato-18/10/87

Ĉeestas: P. Babin, D. Babin, R. Lenel, B. Cheverry, J. Vincent, H. Boyet, F. Boyet, P. Métivier. Senkulpiĝis: G. Dairon, G. Lagrange, F. Le Magadure. La prezidanto malfermas la kunveron je la 9a35.

S-ro Babin informas la komitatanojn pri la forpaso de nia kolego Sro Bodereau kaj la konata amiko Pierre Friedlander.

Raporto pri la pasintaj aktivaĵoj: ĝenerale, iom pli da vizitintoj ol en 1986; mezaĝo sen granda ŝanĝo.

Junio: 34 partoprenintoj anstataŭ 40 en 1986; bona etoso; la homoj deziris labori, tial oni devis starigi tri diversajn kursojn anstataŭ la antaŭviditaj du. Komence de tiu periodo okazis kunveno de "Amitiés franco-chinoises" kaj la postan dimanĉon, vizito kaj komuna manĝo de 30 esperantistoj de Le Mans.

Julio: prelegoj kaj tri kursoj bone ĉeestataj.

Jubilea semajno: tre interesaj prelegoj; bedaŭrinde malmulte da ĉeestantoj.

Julio-aŭgusto: nenio speciala kompare al la antaŭa jaro; la kurso de Dennis Keefe aparte plaĉis.

La SAT-Postkongreso, kiu estis partoprenata de sesdeko da samideanoj bone disvolviĝis.

Dum la monato julio, Dominique Baron zorgis pri la infanoj kaj efike helpis al diversaj taskoj; oni invitos lin reveni en 1988.

Financa aspekto: ŝajnas, ke la enspezoj malkreskis pro tio, ke multaj vizitantoj, revenante de Varsovio, restis nur kelkajn tagojn. Ankoraŭ ne ĉiuj ĉekoj estis enkasigitaj. La elspezoj por salajroj altiĝis.

Venontjara kalendaro:

3/4 - 9/4: renkonto de infanoj; praktikaj konsiloj pri instru-metodoj (kun Audrey Childs-Mee kaj Dennis Keefe).

14/6 - 30/6: internacia amika renkonto: kursoj-

2/7 - 16/7: Cseh-seminario "A"; prelegoj kaj kursoj.

17/7 - 30/7: diversgradaj kursoj.

30/7 - 6/8: "Ĉu verki Valane?" kun Claude Piron; kursoj.

6/8 - 27/8: formado de Esp-instruistoj preparado al Atesto pri Kapableco; diversniveleaj kursoj.

Ekster tiuj periodoj, oni studas proponojn de Giorgio Silfer venigi grupojn de junaj lernantoj pri franca lingvo kaj peton de "Germana Stenografia Junularo" organizi seminarion en Grésillon.

Laboroj: Nova barilo estis instalita ĉirkaŭ la banejo kaj fenestroj estis ŝanĝitaj. Firmao fotis la kastelon de aviadilo: eblos aĉeti kliŝojn por renovigi la bildkartojn. Kontrakto estis subskribita kun novinstalita C.A.T. por prizorgado de la ĝadeno.

La aliĝkotizo estos, por unu semajno: 100 f. por du aŭ tri semajnoj: 150 f. La restad-tarifoj iom altiĝas, krom por infanoj ĝis 6-a jaro. La homoj loĝantaj ekster Grésillon kaj ĉeestantaj la kursoj pagos nur la aliĝkotizon.

Henri Boyet

# LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 400 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.

## VOUS NE POUVEZ PAS

*suivre un cours oral dans votre ville ?*

Pourquoi ne pas essayer nos

### COURS PAR CORRESPONDANCE

**POUR LES DEBUTANTS** : 16 leçons illustrées avec de nombreux exercices. Permet d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

**COURS DE PRATIQUE** : 14 leçons illustrées. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

**NIVEAU SUPERIEUR** : versions, thèmes, études de textes; histoire de l'espéranto et du mouvement espérantiste. Cours et corrections : **90 F.** Notre Libro-Servo peut fournir les livres qui vous manquent.

★★

Inscriptions et chèques à : Maison Culturelle Espérantiste, 49150 Baugé — C.C.P. Nantes 1485-39 P.

## POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« Vigla lernolibro por la praktikanto »

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel aux groupes et aux Libro-Servoj.



## « KULTURAJ KAJEROJ »

regule atingos vin  
se vi  
tuj reabonas



# NIA KONKURSO



## Solvo de la antaŭa enigmo (K.K. 87-3)

La trovata frazo estis : « Mi verkis ĉar mi hontas, ke mi estas homo kaj ĉar mi tutkore amas la homon » (G. Baghy, antaŭparolo de « Hura ! »).

Inter la partoprenintoj estis dislotataj libro-premioj.

200 f.f. al : Suzanne Bourot, Bouresse.

100 f.f. al : Simone Humm, Avignon.

50 f.f. al : Francis Lanz, Parizo.

Ili ricevos nian katalogon el kiu ili povos elekti la libro(j)n.



## Nova konkurso (K.K. 87-4)

La solvon vi rajtas sendi ĝis la 29-a de februaro. Inter la gajnintoj estos dislotataj libro-premioj en la valoro de 200, 100 kaj 50 francaj frankoj.




## Vortoĉeno

Eltrovu la 24 vortojn, kiuj formas ĉenon tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la antaŭa vorto. La unua vorto komenciĝas per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri duliteraj silaboj, do el ses literoj. Jen la signifoj de la vortoj :

1. Malkuraĝa kampa besto. — 2. Ŝmiraĵo. — 3. Kunglui brikojn per mortero. — 4. Suferan-

te deziregi. — 5. Ŝipgvidisto. — 6. Akva planto. — 7. Ĉemizo de antikvuloj. — 8. Arĝentsimila metalo. — 9. Infansimila anĝelo. — 10. Malhelruĝa juvelŝtono. — 11. Marakvokolora juvelŝtono. — 12. Strio el ledo. — 13. Profunde pensadi pri io. — 14. Jugoslavia mono. — 15. Sudeŭropa urbego apud vulkano. — 16. Fino de la terakso. — 17. Skarabo kun kornegoj. — 18. Nazmalsaneto. — 19. Murtegaĵo. — 20. Butika mezuraparato. — 21. Danĝera marvirino. — 22. Desegna enigmo. — 23. Grasa laktajo. — 24. Plata manĝujo.



## GRAVA ATENTIGO

Ek de la unua numero aperonta en 1988 (K.K. 88-1 - marto) komenciĝos nova granda konkurso kiu daŭros dum la tuta jaro. Detalaj reguloj aperos en la venonta numero kun la unua serio de konkursobjektoj. La premioj estos :

1-a premio :

1 000 f.f. por restado en Grésillon.

2-a premio :

500 f.f. por restado en Grésillon.

3-a premio :

200 f.f. por aĉetado de libroj en nia Libro-Servo.

4-a premio :

100 f.f. por aĉetado de libroj en nia Libro-Servo.

5-a premio :

50 f.f. por aĉetado de libroj en nia Libro-Servo.

## Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

**Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7.00 pundŝj).

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

**Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

**Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

**Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10<sup>e</sup>-D 03003 ALICANTE - (1 300 pes.).

**Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).

**Japanio** : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

**Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

**Nederlando** : S-ro M. de Waard, Peppelrode, chambre 418, ds. Th. Fliegerst. 5. 5631 BM EINDHOVEN.

**Norvegujo** : S-ino Louise Bø Marmarvn 2A Oslo 11 (60 kr.).

**Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Federacio Brunngatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

**Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

**Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire  
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

### Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;  
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;  
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;  
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;  
Por studi specialajn problemojn ;  
Por inter amikoj gaje libertempi ;  
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.